NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VO

Organo de Madrida Esperanto-Liceo Januaro 1987

---

## VIVO DE LA LICEO

Zamenhof-festo.- La 13-an de pasinta decembro, bone sukcesis la tradicia Zamenhof-fe tutmonde celebrata ĉiujare de la esperantistaro. Dum la solena parto de ĝi estis laŭ gata prelego pri "Esperanto kaj paco" verkita de D-rino Rafaela Urueña, docentino pr ro en la Universitato de Valladolid. Post tio la 25-persona ĥoro de la Liceo brile mis klasikajn kaj folklorajn diverslandajn ariojn, pluraj el kiuj en Esperanto. Pli cent personoj spektis la feston, kiun sekvis komuna vespermanĝo.

Kotizoj por 1987.- La kotizo restas senŝanĝa por la nova jaro. Ne forgesu pagi ĝin: pes. monate aŭ 1.800 pes. jare.

Ĉu vi volas bone lerni Esperanton?.- Esperanto estas sendube multe pli facila ol ki nacia lingvo, tamen por koni ĝin oni devas unue lerni ĝiajn simplajn gramatikajn re Post tiu bazo, oni devas regule legi multegajn Esperanto-revuojn kaj librojn. En la troviĝas riĉa biblioteko kun ĉ.700 libroj je dispono de la membroj de MEL. La dirir gado donas la eblecon renkonti (kaj noti) novajn vortojn. Dank'al ili, iom post iom povas ekparoli kaj konversacii: tiucele funkcias en la Liceo konversacia rondo. La ta ŝtupo estas partopreni en internaciaj Esperanto-aranĝoj, kie oni akiras parol-fl con kaj amikojn.

La veturado de Pioneer 10.- Fernando Marcos tre klare eksplikis la kazon de Pionee kaj de ĝia voĝajo al Marso dum sia prelego en la Liceo, la 1-an de decembro.

Liceano revizias UEA-n.- La Estraro de UEA komisiis Gian Carlo Fighiera analizi la ciadon de la Asociaj Organoj (Centra Oficejo, Estraro, Komitato, KOmisionoj) kaj v pri tio sendependan raporton kun la celo raciigi la laboron de la nomitaj instanco komisiisto vizitis la C.O. en Rotterdam meze de decembro.

### VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundo, 12 januaro 1987.......... | "Maloficiale pri la lando de la 72-a U Babilado de Ada Sikorska. |
| Lundo, 19 januaro 1987.......... | Libera bufedo. Ĉiu membro estas petat ti manĝaĵon aŭ trinkaĵon. |
| → Lundo, 26 januaro 1987.......... | GENERALA ASEMBLEO DE MADRIDA ESPERAN |
| Lundo, 4 februaro 1987 ........ | "Madrido, hieraŭ kaj hodiaŭ" Prelego Juan Carlós Ruiz |

La kunvenoj komenciĝas je la 20-a horo en Atocha 98-4a etaĝo
Krome, dum la tuta semajno estas bezonataj volontuloj por divers taskoj en la Liceo

NIA VOĈO bezonas tajpist(in)on.- Ekde januaro ni bezonas tajpis(in)on por tajpi, pri fotokopiado kaj eventuale pri sendado de tiu ĉi bulteno. La volontul(in)o an Lupe Sanz kies labor-ŝarĝo por Esperanto jam estas tro granda.

Pozitivaj rezultoj de la loterio.- La biletoj venditaj de la Liceo gajnis sian r Per la vendado de la loteri-biletoj, la Liceo havis profiton de 76.090 pes.

Klara inter ni.- Post longa restado en Francio, Klara González revenis al Madrid

Servulo.- La angola esperantisto vivinta en Madrido, bondeziras el Parizo al ĉi liceanoj.

---

F E L I Ĉ A N N O V A N J A R O N A L Ĉ I U J

JUBILEA KONGRESO



**Ĉiuj por la Kongreso.**- La 16-an de aprilo 1987, dum la Paskaj tagoj, post nur kvar monatoj, malfermiĝos en Madrido la 47-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. La Reĝo de Hispanio, la ĉefministro kaj aliaj eminentuloj aliĝis al la Honora Komitato de la Kongreso. Samjare la esperantistoj celebros tutmonde la centjaran dat-revenon de la kreiĝo de Esperanto. Necesas ke ekde la nova jaro ni koncentrigu ĉiujn fortojn al la sukcesigo de la kongreso, en kiu partoprenos ankaŭ eksterlandaj gastoj.

**Hispana antologio.**- Juan Carlos Ruiz atingis, ke la Hispana UNESKO-Komisiono eldonu propra-koste antologion de la kastili-lingva poezio, en traduko de Fernando de Diego. La pres-provaĵoj estas nun korektataj de Juan Carlos kaj Lupe.

**"Bodas de sangre" en Esperanto.**- La traduko de la verko de Lorca "Sanga nupto" kaj "La domo de Bernarda Alba" (traduko de MIguel Fernández) estas nun reviziata de Miguel G. Adúriz. La Estraro de UEA akceptis la verkon en la prestiĝa serio Oriento-Okcidento, kiel volumon 23. La prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin, verkos la enkondukon de la verko. Dank'al la penadoj de Lupe Sanz kaj de la frato de Juan Carlos Ruiz, la Kultura Ministerio asignis al la Liceo gravan subvencion por la eldono de la traduko.

**Pastro trovita.**- Pastro MUsatti, kiu siatempe deĵoris en Madrido kaj nun parokestras en Valencio, akceptis celebri la Meson en Esperanto dum la Kongreso (Ne oficiala programo)

**Kongresa informilo.**- Augusto Casquero, kiu multfacete kaj senlace laboras por la Kongreso, preparas novan informilon por la estontaj kongresanoj: ĉiuj necesaj informoj devos atingi lin ĝis la fino de januaro.

**Prov-ekskurso al Toledo.**- Ana MOntesinos kaj ges-roj Fighiera vizitis Toledon per organizita ekskurso por esplori la necesojn de la kongresa ekskurso.

**Kongresa afiŝo.**- LKK sendas afiŝon de la 47-a Hispana KOngreso de Esperanto kontraŭ 50 pes (sendu postmarkojn) aŭ 2 internaciaj respond-kuponoj por eksterlandanoj.

## OKAZAS EN HISPANIO

**De Sabadell senpage al Krakovo.**- Komence de oktobro komenciĝis en Sabadell elementa kurso: kiel kuraĝigan, la du plej bonaj lernatoj ricevos senpagan restadon en la TEJO-Kongreso, ĉi jare en Krakovo. Krome la skabenaro eldonis koloran turisman broŝuron en Esperanto.

**Astura bukedo.**- Aperis en Gijon tiu-ĉi perlo de la hispana literaturo. Mendojn (550 pes) sendu al Astura Esperanto Asocio. Enrique Cangas 25. Gijón 33006 (ASTURIAS)

CURSO ELEMENTAL DE ESPERANTO    CURSO ELEMENTAL DE ESPERANTO

Profesora: Lucrecia San Antonio
Días: miercoles y viernes de 6 ½ a 7 ½
Duración: 3 meses

Lugar: FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO
Rodriguez San Pedro 13-3º-7
(Metro Quevedo).

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012




KONGRESO
HISPANA
ESPERANTO
MADRIDO 1987
16-20a aprilo

# MEMORIA DE LAS ACTIVIDADES DEL AÑO 1986

Liceo Madrileño de Esperanto

Registro aso. Madrid nº 245
C.I.F. G 28 726248
Atocha 98-4º. 28012 Madrid

La principal labor realizada d rante el año de 1986 ha sido la organización del Congreso Nacional de Esperanto que tendrá lugar en Madrid durante el año de 1987. Se ha conseguido un Comité de Honor integrado por relevantes personalidades del mundo de la política, la cultura y el deporte y se ha desarrollado todo un programa de actividades encaminadas a celebrar con éxito el Congreso del Centenario de la Creación de la Lengua Internacional Esperanto.

A continuación se resumen las actividades organizadas por el Liceo Madrileño de Esperanto durante el año de 1986 incluyéndose tambien aquellas en las que han participado sus miembros aunque hayan sido organizadas por otras asociaciones esperantistas.

## Conferencias y proyecciones

Se han programado las siguientes conferencias y proyecciones comentadas:

.- Diferencoj inter Britio kaj Hispanio. Wicky Keates
.- Araba kaj Esperanta literaturo. J. Camacho.
.- ILEF Festivalo en Pisanica (Bulgario). J. Fernándes Arroyo.
.- Angolo mia lando. Servulo.
.- La folozofio de Kartesio. R. Albert
.- Enkonduko en la ĉina lingvo. A, Montesinos.
.- ¿Qué es el Esperanto?. J.C. Ruiz
.- Nia amiko la kometo Halley. J.M. Gonzáles Aboín.
.- Iom pri la ŝakulodadon. J. Sánches
.- La historio de la klopodoj por la internacia lingvá.A. Figuerola
.- El idioma internacional Esperanto. J. Navareño.
.- Malsanoj de la parolkapablo. A. Casquero
.- Esperanto kaj pacifismo. Ĉu samdirekte?. R. Urueña.
.- La Universala KOngreso de Pekino. A. Sikorska.
.- Pirandello aŭ la vivo estas teatraĵo. J.C. Fighiera.
.- La veturado de Pioneer 10 al Mardo. F. Marcos.

## Enseñanza.

Como es ha bitual el Liceo ha organizado cursos básicos y de perfeccionamiento en su propia sede. Tambien ha auspiciado y enviado profesores a los organizados en: "Centro Cultural Maestro Alonso", Alcorcón, Oficina de HEF, Moratalaz, Club de Amigos de UNESCO, Facultad de Filología de U.A.M. y Seminario en el Colegio de LIcenciados. Todos los cursos han sido gratuitos con la colaboración desinteresada de los profesores.

[illegible]aganda

Los cursos se han [illegible] de carteles pegados por los miembro[illegible] del Liceo y con la colaboración de [illegible]. Entre otras se han emitido espacios sobre el Esperanto en las emisoras [illegible] Radio Guadalajara y Radio 2.

Traducciones y publicaciones

Se han concluido las traducciones de una antología de poesía española y [illegible] dos piesas teatrales de García Lorca. Ambas obras se publicarán en la colección "Hispana Literaturo" en próximo año

Además los miembros del Liceo han publicado lo siguiente:

- Nº 2 de "Hispana Literaturo". Colaboración en la traducción de [illegible] obra del escritor asturiano Angel Gonzáles para ser incluida en la [illegible] Antologio" (traductor Jorge Camacho)
- Monato nº 3 y 4/1986 Colaboraciones.
- "Poemaro de la paco" libro de poesía editado por la Asociación [illegible]sal de Esperanto en el que fué seleccionado un poema de J. Fernández Arroyo.
- Edición de 3.000 ejemplares de un folleto plegable con informa[illegible] [illegible]bre la lengua internacional Esperanto.
- Periódico "Heroldo de Esperanto". Redacción en Madrid. Dis[illegible]

[illegible]iones

Miembros del Liceo han asistido participando activamente a [illegible] [illegible] reuniones esperantistas:

- 57º Congreso Italiano de Esperanto. Bolonia (Italia)
- Congreso Catalán de Esperanto. Barcelona
- 59º Congreso de S.A.T. (San Cugat del Vallés)
- 46º Congreso Español de Esperanto (Vigo)
- 71º Congreso Universal de Esperanto (China)
- 2º Seminario sobre el problema linguístico en turismo (Bud[illegible]
- Curso para profesores de Esperanto. La Chaux-de-Fond (Suiza[illegible]
- 4º Congreso Andaluz de Esperanto. (Granada)
- 1º Encuentro de la Unión Esperantista Andaluza.

Salvo en casos excepcionales, los gastos de participación en estos [illegible] reuniones han sido sufragados por los propios participantes.

[illegible]as actividades

- Durante 1986 han visitado el Liceo 17 esperantistas de los siguientes países: Hungría, Argelia, Gran Bretaña, Japón, Polonia, China, Alema[illegible] RFA, [illegible], Italia y Francia.
- Dos becas a cargo de la Aso. Universal de Esperanto para trabajar en [illegible] [illegible]rdam (Holanda) concedidas a dos miembros del Liceo
- [illegible] Esperanto celebrada en Hogar del [illegible] [illegible]

.- Todos los lunes del año se ha celebrado en la sede del Liceo una tertulia en Esperanto.

.- Excursiones recreativas a localidades próximas a Madrid

.- Contactos con esperantistas extranjeros en los viajes de placer o trabajo realizados por miembros del Liceo.

.- Miembros del Liceo obtuvieron 2 premios en el Concurso de Bellas Artes organizado por la Asoc. Universal de Esperanto.

.- Exposición de libros turísticos en Esperanto en el recinto de FITUR-86

.- Aumento de los fondos de la biblioteca del Liceo.

.- Publicación mensual de un boletín informativo que se distribuye entre los socios del Liceo y a todos los grupos esperantistas de España.

.- Diversas actuaciones del coro del Liceo "Verda Stelo"

.- Adaptación al Esperanto de canciones populares españolas.

.- Exposición de acuarelas de Arquímedes Ballester en las sede del Liceo.

.- Un miembro del Liceo abogó por el Esperanto como lengua internacional en una reunión de la CEE con especialistas en carbón y acero.

.- Organización de un viaje a China para asistir al congreso internacional de Esperanto celebrado en Pekin.

.- Mantenimiento y acondicionamiento del local.

.- En Madrid se publica la revista "KABE" sobre ordenadores personales, intercambio de psogramas e idèas, todo ello en Esperanto.

La Presidenta del LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO convoca:+

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

| | |
|---|---|
| Día | 26 de enero lunes |
| Hora | 20.00 |
| Lugar | Atocha 98-4º |


Con el siguiente orden del día:

1.- Lectura y aprobación, si procede del acta de la asamblea anterior
2.- Resumen de actividades llevadas a cabo durante 1986
3.- Informe economico 1986
4.- Presupuesto 1987
5.- Ruegos y preguntas.

La Presidenta

Madrid 29 de dicembre de 1986

Si te es posible coloca en algun lugar visible el anuncio de nuestro próximo curso que figura al dorso. Gracias




# ESPERANTO

## EL IDIOMA INTERNACIONAL

## CURSOS GRATUITOS

ABIERTOS A TODAS LAS EDADES

Comienzo : Dia 7 de ENERO
Duración : 3 meses
clases : Miercoles y VIERNES. 6½-7½
Lugar : Rodriguez San Pedro 13-3º 7

Federacion Española DE ESPERANTO

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO

ORGANO DE LA MADRIDA ESPERANTO-LICEO

JANUARO 1.987

---

**PRIORITATO AL LA KONGRESO:** La Madridaj esperantistoj havas la justan ambicion, ke la 57a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos dum Pasko en la ĉefurbo, estu memorinda sukceso.

La laboro, kiu staras antaŭ ni por la venontaj monatoj, estas granda kaj postulas intensan forto-streĉon. Tamen, sendube ĉiuj plenumos ĝin kiel eble plej bone.

Por koncentrigi niajn fortojn el la organizado de la Kongreso, ekde nun la lundaj kunvenoj estos prioritata dediĉitaj al Kongresa preparado. Madrida Esperanto Liceo alvokas ĉiujn membrojn al kunlaboro, ne nur pre konsiloj, sed per plenumo de efektivaj taskoj.

**CAMACHO EN GERMANIO, J.C. RUIZ EN FRANCIO:** Fine de la pasinta jaro, Georgo Camacho partoprenis en la tradicia internacia seminario de Germana Esperanto-Junularo en Kolonjo (pli ol 340 partoprenantoj el 26 landoj). Post tio, li deĵoris unu semajnon en la centra oficejo de U.E.A., en Rotterdamo. Siaflanke, Juan Carlos Ruiz meze de januaro veturis profesi-cele al Francio kie li ĉeestis kunvenon.

**INFORMA DOKUMENTO POR SERIOZA PROPAGANDO:** Ĝis nun, kiam ni devis informi pri Esperanto oficialajn instrancojn aŭ ĵurnalistojn, ni nur povis transdoni voĉajn informojn, ne ĉiam kompletajn kaj korektajn. Ekde nun ni disponas pri skriba, science ellaborita dokumento, titolita **"Datos acerca del movimiento esperantista"**, kiu en 10 paĝoj resumas la ecojn kaj la atingojn de la Internacia Lingvo. La dokumento dividiĝas en tri partojn:

-bazaj aspektoj kaj celoj de Esperanto.

-ĝiaj ĝeneralaj valoroj (sociaj, edukaj, ekonomiaj, kulturaj, k.t.p.).

-Esperanto en Hispanio.

La aŭtoroj de la eseo estas Gian Carlo Fighiera kaj Juan Carlos Ruiz, kun la kunlaboro de eminentaj esperantistoj kiel Urueña, Regulo, k.a.

Oni povas peti kopion de la dek-paĝa verko ĉe la sekretariejo de la Liceo, por uzo en gravaj cirkonstancoj.

nia voĉo

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO

**PRELEGO EN LA BLINDUL-ASOCIO:** En januaro, Angel Figuerola, eks-prezidanto de H.E.F., prelegis pri Braille kaj Zamenhof en la Fonoteko de O.N.C.E.

**ESPERANTO SUR LA ONDOJ:** Intervjuoj pri la Internacia Lingvo estis dissenditaj de la jenaj radio-stacioj: Popular, Radio Cadena, Onda Madrid, Antena 3.

**"100 JAROJ DE ESPERANTO"** Pri tiu-ĉi temo Juan Carlos Ruiz Sierra gvidos kolokvon en la Kultura Centro "José Espronceda" (Almansa, 9 Cuatro Caminos), lundon la 9-an de februaro je la 20-a horo.

En la sama ejo, la koruso de la Liceo prezentos sian repertuaron sub la direktado de Periko Villaroig.

**NOVA KURSO:** Komenciĝis nova elementa kurso en la Liceo kun la aliĝo de dudeko da gelernantoj (marde kaj jaŭde, je la 19-a horo). La kurso estis anoncita per surstrataj afiŝoj (gluitaj de Liceanoj dum la nokto) kaj informoj en diversaj gazetoj.

**ESTRARANO DE U.E.A. EN MADRIDO:** En januaro, Diccon Masterman, estinta K.K.S. kaj nuna Estrarano de U.E.A., vizitis Madridon kaj paroladis en la Liceo. Kelkaj Madridaj esperantistoj starigis al li demandojn kaj kritikojn pri la funkciado de U.E.A.

**44 PROPONOJ AL U.E.A.** En sia fina 25 - paĝa raporto pri la ebla raciigo de la laboro de la organoj de U.E.A., Gian Carlo Fighiera prezentis 44 proponojn, kiuj ĉefe rilatas la funkciadon de la Centra Oficejo en Roterdamo.

**"NIA VOĈO" BEZONAS HELPON:** Tiu ĉi bulteno havas du problemojn. Unue, necesas urĝe trovi taŭgan tajpist(in)on por kopii la tekston kaj zorgi por ĝia reprodukto. Due, ekde la 1a de januaro 1.988 ni bezonos novan redaktor(in)on por anstataŭi la nunan provizoran redaktoron, kiu nepre ekstigos je tiu dato.

## VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundo, 2 februaro 1.987 .................... | "Madrido, hieraŭ kaj hodiaŭ". Prelego de Juan Carlos Ruiz. |
| Lundo, 9 februaro 1.987 .................... | Konversacia Rondo. |
| Lundo, 16 februaro 1.987 .................... | Libera bufedo. Ĉiu membro estas petata alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon. |
| Lundo, 23 februaro 1.987 .................... | Konversacia Rondo |
| Lundo, 2 de marto 1.987 .................... | "Maloficiale pri la lando de la 72-a U.K.". Babilado de Ada Sikorska. |

**La kunvenoj komenciĝas je la 20-a horo en Atocha,98 - 4a etaĝo. Krome, dum la tuta semajno estas bezonataj voluntuloj por diversaj taskoj en la Liceo.**

## JUBILEA KONGRESO

**HELPO DE LA MADRIDA KOMUNUMO:** Okaze de la vizito al Urbodomo fare de Augusto Caquero kaj Gian Carlo Fighiera, oficiala reprezentantino promesis:

1) La Urbestro de Madrido (aŭ lia persona reprezentanto) malfermos la Kongreson.
2) La Urbo disponigos senpage aŭtobuson kun gvidisto por vizito al la ĉef-urbo.
3) La Urbo akceptos kaj regalos la kongresanaron lundon, la 20-an de aprilo 1.987, je la 19-a horo.

**DUA BULTENO KAJ KONGRES-LIBRO:** La Bulgara Esperanto-Teatro ludos dum la Kongreso, aldone al la verko de Arrabal, ankaŭ mallongan teatraĵon de Cervantes: "La grotoj de Salamanca".

## OKAZAS EN HISPANIO

**LUKSA BROSURO PRI HISPANIO:** La Supera Autoritato por Turismo (Ministerio pri Transporto, Komunikado kaj Turismo) jus eldonis luksan, plurkoloran, tridek-paĝan turisman broŝuron pri "Hispanio".

**ALIGU AL NIA TUTLANDA MOVADO:** La Esperanta Movado estas organizita je tri ŝtupoj: internacia, landa kaj loka. La tri ŝtupoj ne estas izolitaj unu de la alia, sed piramide integriĝas unu en la alian: loka grupo aliĝas al landa asocio, kiu aliĝas al U.E.A.

Hispana Esperanto-Federacio kunordiĝas la laboron por Esperanto en tiu-ĉi lando kaj reprezentas ĉiujn hispanajn esperantistojn. Por subteni ĝian laboron kaj ricevi ĝian organon "Boletín", vi aliĝu al ĝi. Jen ĝiaj kotizoj por 1.987:

| | |
|---|---|
| - Individua membro | : 1.500 Ptas. |
| - Protektanta membro | : 3.000 Ptas. |
| - Junulara m. (HEJS) | : 1.000 Ptas. |
| - Emerita membro | : 1.000 Ptas. |
| - Dumviva membro | : 30.000 Ptas. |

Pagon sendu al: **H.E.F., Caja de Pensiones para Vejez y de Ahorros, libreta n 2.303-26, Agencia Riera Blanca 463 08028 Barcelona.**

**SUBVENCIOJ EN BILBAO, SABADELL KAJ SANTIAGO:** La Grupo Esperantista de Bilbao ricevi subvencion de 125.000,- Ptas. de la "Diputación Foral de Vizcaya".

Aliflanke, la "Generalitat de Catalunya" donis subvencion de 150.000,- Ptas por la organizo de la 59-a S.A.T. kongreso.

Fine, la Galega Registaron subvenciis la Grupo Santiago de Compostela per 75.000, Ptas. por eldono de informilo pri Esperanto.

**LA HISPANA KONGRESO 1.988 EN VALENCIO:** La Esperanto-societo de Valencio [illegible]

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO
Februaro 1.987

## VIVO DE LA LICEO

**Ĉio kaj ĉiuj por la Kongreso:** La preparo de la 47-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 16-a ĝis la 20-a de aprilo (Pasko) en Madrido, kaj pri kiu ni parolas jam de preskaŭ du jaroj, ekde nun okupos ĉiujn niajn fortojn.

Unue, ni alvokas ĉiujn, kiuj sentas sin esperantistoj, plenumi sian moralan devon kontribui al la sukceso de la Kongreso per sia aliĝo al ĝi kaj per deĵorado en la kongresejo.

Due, ni dediĉos la lundajn kunvenojn unuavice al la pritraktado de la kongresaj organizaj demandoj.

**"Bodas de sangre" baldaŭ:** La traduko de Esperanto de du verkoj de Lorka estas nun komposata kaj pres-prove korektata en Madrido. La verkoj aperos ĝis la Kongreso kiel eldono de la Madrida Esperanto-Liceo.

**Teatro serĉata:** Ĝis nun ne sukcesis la klopodoj de LKK trovi taŭgan teatron. Ĉiuj vizititaj ejoj aŭ ne estos liberaj aŭ ne disponas pri sufiĉe da sid-lokoj.

**La Prezidanto de UEA en Madrido:** D-ro. Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, partoprenos en la Kongreso, en kiu li fest-parolados.

**Repagu la biletojn de la Loterio:** Se vi mendis biletojn de la loterio por vendi, bonvolu pagi ilin ĝis la 22-a de marto.

**Du gvidantoj de TEJO en Madrido:** En februaro, Alex Humet, kataluno loĝanta en Belgio, kaj juna germana esperantisto -ambaŭ TEJO aktivuloj- vizitis la sidejon de MEL.

**Dokumento por ĵurnalistoj:** Se vi informas ĵurnalistojn, ne forgesu transdoni al ili kopion de la dokumento pri Esperanto, kunmetita de elstaraj esperantistoj, kiu troviĝas en la sekretariejo de la Liceo. Ĝi scienc-metode listigas faktojn pri Esperanto.

**Artikolo en "El País":** En longa artikolo pri lernado de fremdaj lingvoj (aliaj ol la angla), kiu aperis en "El País" en januaro, Esperanto estas citita per aparta paragrafo.

**Lucrecia prelegos en la Ateneo:** Ĵaŭdon, la 26-an de marto Lucrecia San Antonio prelegos pri Esperanto en la Ateneo de Madrido (Prado, 21) je la 19,30 h. Prezentos ŝin Adelaida Las Santas (Aguacantos).

| VENONTAJ PROGRAMOJ | VENONTAJ PROGRAMOJ |
|---|---|
| Lundo, 2 marto 1.987 .............................. | Konversacia rondo (ĉefe pri la Kongreso) |
| Lundo, 9 marto 1.987 .............................. | "Maloficiale pri la lando de la 72-a U.K." (babilado de Ada F.) |
| Lundo, 16 marto 1.987 .............................. | Libera bufedo. Ĉiu membro estas petata alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon). |
| Lundo, 23 marto 1.987 .............................. | Konversacia rondo (ĉefe pri la Kongreso) |
| Lundo, 30 marto 1.987 .............................. | Konversacia rondo (ĉefe pri la Kongreso) |
| Jaŭdo, 16 aprilo 1.987 .............................. | Komenciĝas la Hispana Kongreso en Madrido. |

ua kongreso informilo: La kongresanoj ricevos komence de marto la plur-paĝan duan ongresan informilon, kiun tajpis Perico Villaroig. La redakto de la kongresa libro am komenciĝis.

## OKAZAS EN HISPANIO

Ionore al Juan Régulo: Okaze de la emeritiĝo de Prof. Juan Régulo Pérez, la Univer... ato de La Laguna eldonis gratul-verkon kun divers-temaj monografioj, kelkaj ... iuj en Esperanto, kiel la eseo de D-ro. A. Baur pri la retoromanca skrib-lingvo.

Iallonge pri Andaluzio: En 1.986 malfermiĝis en Kordovo 6 elementaj Esperanto-kursoj. a loka radio-stacio "Radio Lupa" dissendadis ĉiusabate duonhoran programon pri sperantо. En Torrox, kie ni redaktas la bultenon "Gazeto Andaluzia", okazis kurso le la Internacia Lingvo. En Seviljo ĉiusemajne okazas ĵaúdaj parolhoroj kun divers-emaj prelegetoj: la televid-stacio "Telesur" raportis pri la ĉi-jara kurso. Elementa aj meza kursoj funkciis en Malago. La 5-a Andaluza Kongreso de Esperanto okazos n Torroz (Malago) de la 15-a ĝis la 21-a de aúgusto 1.987.

Iova libro-katalogo: La libroservo de Hispana Esperanto-Federacio eldonis dudek-paĝan ibro-katalogon dividitan laú 30 temoj.

Per biciklo al Varsovio: Estas preparata biciklado tra Eúropo por atingi la Universalan ongreson en Varsovio. Informas: Jorgos, 12 Pl. Picasso, 666.400 Ceret, Francio.

Pandemonio eldonos: Estas presata kolekto de 18 verkoj de 6 junaj aútoroj, kvar el kiuj (M. A. Sanĉo, G. Kamaĉo, K. Moleono kaj R. Albert) estas Madridanoj. La rupo nomiĝas "Pandemonio".

Triptiko pri Santa Coloma: Laú peto de loka Esperanto-societo, la urbestraro ...e Santa Coloma de Gramanet eldonis propagandan triptikon en la kataluna kaj Esperanto.

Esperanto-strato en Vigo: La urbestraro de Vigo decidi nomi "Esperanto" straton de la urbo.

Esti membro de la Universala Esperanto-Asocio: UEA estas la monda asocio de ĉiu esperantisto; al ĝi aliĝas la landaj Esperanto-asocioj (incluzive de H.E.F.) ĉie en la mondo.

Individua Membro kun jarlibro pagas 1.200,- pes. jare. Individua Membro kun jarlibro kaj la revuo "Esperanto" pagas 3.000,- pes. jare.

Esperantisto estas homo kun universalaj interesoj: UEA estas lia Asocio, kune kun H.E.F. kaj la Madrida Esperanto-Liceo.

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO
MARTO 1.987

## JUBILEA JARO

Post kelkaj tagoj komenciĝos la Kongreso: ĉ. 50 eksterlandanoj aliĝis ĝis nun al la47-a Hispana Kongreso de E-o, kiu komenciĝos en Madrido la 16-an de aprilo 1.987.

La programo proponas riĉan serion de aranĝoj, kiujn oni povas ordigi jene:

- Oficialaj kaj laboraj kunvenoj: malfermo (prelegos Tonkin), fermo (Auld), Delegita kunsido kaj Ĝenerala kunveno de H.E.F., kunvenoj de H.E.J.S., fakaj kunvenoj.
- Kulturaj programoj: intensiva supera kurseto (Alonso), artaj kaj kulturaj horoj, teatra vespero (Bulgara Esperanto Teatro), Madrido tra la jarcentoj (Ruiz), Esperanto-ekzamenoj.
- Distraj programoj: vizito al Planetario, promenado tra Historia Madrido, aŭtobusa ekskurso al Toledo, bankedo, akcepto fare de la Urbestro, k.t.p..

Venu ankaŭ vi: se vi ĝis nun ne aliĝis al la Kongreso de la Jubilea Jaro, rapidu kongresaniĝi.

Aperis "Sentempa Sinfonio": dank' al subvencio de la Hispana Unesko-Komisiono, ĵus aperis kolekto de hispanaj poemoj en traduko de Fernando de Diego. La titolo estas "Sentempa Simfonio".

## VIVO DE LA LICEO

| VENONTAJ PROGRAMOJ | VENONTAJ PROGRAMOJ |
|---|---|
| Lundon, 6 aprilo 1.987 .............. | Konversacia rondo pri la Kongreso |
| Lundon, 13 aprilo 1.987 .............. | Konversacia rondo pri la Kongreso. |
| Ĵaŭdon, 16 aprilo 1.987 .............. | Komenciĝas la Kongreso |
| Lundon, 20 aprilo 1.987 .............. | ne okazas kunveno. |
| Lundon, 27 de aprilo 1.987 .......... | Konversacia rondo (impresoj pri la Kongreso). |
| Lundon, 4 majo 1.987 .............. | Konversacia rondo pri libera temo |
| Lundon, 11 majo 1.987 .............. | Prelego anoncota |
| Lundon, 18 majo 1.987 .............. | Libera bufedo (ĉiu membro estas petata alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon). |
| Lundon, 25 majo 1.987 .............. | Konversacia rondo |

LA KUNVENOJ KOMENCIĜAS JE LA 20-A HORO EN ATOCHA,98 - 4a ETAĜO. KROME, DUM LA TUTA SEMAJNO ESTAS BEZONATAJ VOLONTULOJ POR DIVERSAJ TASKOJ EN LA LICEO.

Prelegoj en Madrido: Juan Carlos Ruiz prelegis pri "Cent jaroj de E-o" en la Kultura Centro en la kvartalo de Tetuán: post la prelego okazis interesa diskuto.

Pri la sama temo prelegis Pepe Arroyo en Centro de Promoción de Adultos en la kvartalo Fuencarral, kie li projekciis sian filmon "Popola arto ponto inter popoloj".

Liceano instruas en Segovio: César Moiteryrin, membro de M.E.L., instruas Esperanton en la "Casa de Deportes" de Segovio.

Radio-intervjuo: Lucrecia San Antonio, kiu instruas Esperanton en Rodriguez San Pedro, estis intervjuita en Radio Cadena.

Vizito de Eva Formaggio: La denaska esperantistino Eva Formaggio, filino de itala kaj hungara geesperantistoj, meze de marto vizitis la Liceon kaj restadis kelkajn tagojn en Madrido.

## OKAZAS EN HISPANIO

Broŝuro pri Hispanio: la tuta stoko estas disdonita inter hispanaj kaj eksterlandaj Esperanto-grupoj kaj lokaj esperantistoj. Eble, kelkaj ekzempleroj estos haveblaj ĉe la Kongresa Libroservo.

La viv-aventuro de Giordano Moya: "La homa viv-aventuro" estas ĵus aperinta autobiograf-verko de Giordano Moya Escavola, redaktoro de "Boletín".

**Sociologia enketo:** ses infanoj de la kolegio "Codes" de Oviedo okazigis, kiel lernejan taskon, publikan enketon inter 300 personoj pri ilia opinio koncerne Esperanton. La respondoj estis analizitaj laŭ kvin aĝo-grupaj: 5 - 15 jaroj, 16 - 30 jaroj, 31 - 50 jaroj, 51 - 65 jaroj, pli ol 65 jaroj. Entute, 55 % de la pridemanditoj jam antaŭe aŭdis pri Esperanto, dum la restantaj 45 % ne antaŭkonis ĝin.

**Hungaro deziras viziti Hispanio:** Jorge Taxner (Széchenyi Utca 1, VI. 104 H-1054 Budapeŝto, Hungario) 17-jare lernanto de Esperanto kaj de la hispana ŝatus viziti studo le Hispanion kaj restadi dum kelkaj semajnoj en familio kun samaĝa infano. Li reciprokos per sama gastado en Hungario.

## OKAZAS EN LA MONDO

**Esperanto 100-jara. Internacia Scienca Simpozio:** la Aŭstria Laborkomitato "Esperanto - 100 jara" en kunlaboro kun la Lingvistika Instituto de la Universitato de Vieno kaj la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, organizas de la 28-a ĝis la 30-a de oktobro 1.987, en la Viena Universitato Internacian Sciencan Simpozion. Parolos diversnaciaj sciencistoj de diversaj sciencobranĉoj pri la fenomeno Esperanto, ĝiaj lingvistikaj, historiaj, pedagogiaj, informatikaj, literaturaj kaj aliaj aspektoj. Diskutlingvoj estos Esperanto kaj la germana.

La patronadon transprenis diversaj federaciaj ministroj, la urbestro, la universitata rektoro, CED de UEA kaj la Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino. Inf.: **A.L. Esperanto 100-jara, Postflach 92, A-1183 Wien.**

**Lingvistoj en Belino:** la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj havos lokon en Berlino de la 10-a ĝis la 15-a de aŭgusto. Funkcios 19 laborsekcioj interesaj por esperantologoj ekzemple: Linvaj kontaktoj -Alproprigo de lingvoj- Komputa lingvistiko -Universalaĵo kaj tipologio -Historio de lingvosciencoj. Inf.: **D. Blanke, Pf. 113, O. Nagel-Str. 110 DDR-1141 BERLIN.**

**Unua libro:** la nederlanda firmao BSO studas sistemon por perkomutila tradukado, uzante modifitan Esperanton. Pri la projekto aperis unua libro verkita de B.C. Papegaaij A.P.M. Witkam kaj V. Sadler: "An interlingual knowledge-based approach" (eld. Foris) (E).

**Inaŭguro:** lastan jaron, la urba konsilantaro de Chambéry (Francio) decidis pri nomigo de skvaro "Zamenhof". Oficiala inaŭguro okazos la 10-an de majo 1.987.

---

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA V

Barcelono subvenciis junulon: Barcelona Esperanto-Centro asignis subvencion de 10.0 Pes. al Jesus Armengoe, por helpi lin partopreni en la TEJO-Kongreso en Krakovo.

Organo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID
Majo-junio 1987

La Kongreso brile sukcesis.- La Madridaj esperantistoj bone plenumis sian taskon organizi la 47-an Hispanan Kongreson de Esperanto. La rezultoj povas esti jene resumitaj:

.- Partoprenado: la plej alta ek multaj jaroj (350 kongresanoj)
.- Karaktero: malpli longa kongreso, sed pli labora kaj kultura ol antaŭe.
.- Programoj: pli mult-nombraj ol kutime
.- Literaturo: Du teatraĵoj de Lorca en Esperanto (donaco al ĉiuj komgresanoj) kaj aliaj 9 novaj verkoj prezentitaj.
.- Teatro: Verkoj de Cervantes kaj Arrabal luditaj publike de Bulgara Esperanto-teatr
.- Oficialaj gastoj: Simo Milojevic, direktoro de la Centra Oficejo de UEA (Rotterdamo), Willian Auld (Britio), verkisto kaj Akademiano.
.- Scienco kaj kulturo: alt-nivelaj artaj kaj sciencaj horoj, inter kiuj elmontrado d lasero.
.-ĉeestado: ĉiuj salonoj ĉiam plenaj, eĉ dimanĉe: dum unu kunveno ne sufiĉis la sidlokoj kaj kelkaj da personoj ne povis eniri.
.- Ĥoro "Verda Stelo": publika ludado
.- Distraj programoj: pied-vizito tra Madrido (120 personoj), post-kongresa ekskurso al Toledo (du aŭtobusoj), interkona vespero kun senpaga kaj senlima sangrio, bankedo (200 personoj),k.t.p.
.- Propagando: dek radiaj, tri televidaj, intervjuoj, artikoloj en gazetoj, k.t.p.
.- Honora Komitato: la Reĝo, kvar ministroj, tri rektoroj de Universitato, famuloj
.- Financa rezulto: tre bona
.- k.t.p., k.t.p., k.t.p.

Universala Kongreso La Liceo organizas komunan vojaĝon al Varsovio. Jam aliĝis 8 personoj

Georgo Kamaĉo ĉe Gadafi.- Kune kun aliaj studentoj pri araba filologio, Georgo Kamaĉo en aprilo vizitis Libion. Intertempe, Juan Carlos Ruiz vizitis deĵor-cele Budapeŝton, kie li renkontis esperantistojn. Gian Carlo Fihiera fak-prelegis en Tesaloniko (Grekio)

Akademiano en Madrido.- D-ro. Bruce Sherwood (Usono), membro de la Akademio de Esperanto, prelegis en la Liceo pri la perkomputila instruado de Esperanto. Vizitis MEL ankaŭ tri fr caj geesperantistoj, biciklantaj tra Europo.

Prelego en Segovio.- Pepe Arroyo en marto prelegis pri Esperanto en la Casa del Deporte en Segovio kaj en Kultura Centro de Kvartalo Fuencarral en Madrido

Prelego en la Ateneo.- ĉirkaŭ 80 personoj auskultis en la Ateneo la prelegon pri Esperant de Lucrecia San Antonio.

Lorca en la Nacia Hemeroteko.- La 4-an de junio ĉi-jara, je la 19,30 h, Miguel Fernández prezentos publike sian tradukon en Esperanto de du teatraĵoj de Lorca. La ĉeesto de la Liceanoj estos bonvena. Strato Magdalena n-ro 10, proksime al metroo "Antón Martín"

Ekspozicio de Esperanta literaturo.- Inter la 2-a kaj la 12-a de junio oni povas viziti la ekspozicion de Esperantaj libroj en la ejoj de la Nacia Hemeroteko, Magdalena 10.

Augusto Casquero translokiĝos.- La prezidanto de LKK, Augusto Casquero, kiu dum multaj jaroj gvidis la Liceon kaj senlace laboris por la Internacia Lingvo en Madrido, baldaŭ forlasos la ĉefurbon por translokiĝi al sia denaska Valencio, kie li laboros kiel pedago

go de infanoj kun parol-malfacilaĵoj. Por esprimi sian dankemon al li, la Madridaj esperantistoj multnombre partoprenos en la venont-jara nacia kongreso kiun li preparas en Valencio.

Venonta redaktoro serĉata.- La nuna provizora redaktoro de "Nia Voĉo", kiu jam de du -roj plenumas sian taskon, definitive forlasos sian postenon dum la venonta ĝenerala kunveno de Esperanto-Liceo de Madrid.

Ekskurso al Las Torcas.- La 6-an kaj 7-an de junio la liceanoj ekskursos al Las Torcas, kie ili tendumos kaj renkontiĝos kun valenciaj esperantistoj

Venontaj paroladoj.- "La fontoj de Esperanto" de F. González Aboín (julio), "Vojaĝo al Libio" de Georgo Kamaĉo (septembro), "La filozofio de Kant" de Rikardo Albert (oktobro), "Komputila tradukado" de Juan Carlos Ruiz (novembro), "La fest9 de Sankta Nikolao" de Ada Fighiera (decembro), "Flamenco, kanto kaj danco" de Pepe Platas (januaro), "Akuzito Machiavelli, ekstaru!" de Gian Carlo Fighiera (februaro)

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundo, 1 de junio 1987............. | Konversacia rondo |
| Jaŭdo, 4 de junio 1987............. | Prezentado de "Sanga nuptp" tradukita de Miguel Fernández. NACIA HEMEROTEKO. Magdalena 10. 19,30 h. |
| Semajfino 6-7 de junio .............. | Ekskurso al Las Torcas (Cuenca) |
| Lundo, 8 de junio 1987 ............ | "La lando de la 72-a U.K.". Ada Fighiera |
| Lundo, 15 de junio 1987 ............ | Libera bufedo (ĉiu membro estas petata alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon) |
| Lundo, 22 de junio 1987 ............ | Konversacia rondo |
| Lundo, 29 de junio 1987 ............ | Konversacia rondo |
| Lundo, 13 de julio 1987 ............ | "La fontoj de Esperanto" parolado de J.M. González Aboín. |

La kunvenoj komenciĝos je la 20-a horo en Atocha 98-4-a etaĝo. Krome, dum la tuta semajno estas bezonataj voluntuloj por diversaj taskoj en la Esperanto-Liceo de Madrid

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
SEPTEMBRO- 1987

Redaktas: G.C.Fighi
Tajpas: Lupe
175 ekzempleroj

## VIVO DE LA LICEO

Nova sezono komenciĝas.- Post la gravaj eventoj ĉi-jaraj*rekorda kongreso en Madrido kaj senprecedenca jubilea kongreso en Varsovio*rekomenciĝas la vivo de la Madrida Esperanto-Liceo. Espereble, la aktivaĵoj estos riĉaj de kursoj, informaj agadoj, kulturaj kaj distraj eventoj.

Programoj.- Se la MEL-anoj ne decidas alimaniere, la monataj lundoj programoj sekvos la saman skemon, kiel en la pasinto, nome:

1-a lundo............ Konversacia rondo
2-a lundo ........... Prelego aŭ parolado
3-a lundo ........... Libera bufedo
4-a lundo ........... Konversacia rondo

Augusto Casquero kaj Ana Montesinos.- La Prezidanto de LKK de la Madrida Kongreso, Augusto Casquero, translokiĝis al sia hejm-urbo, Valencio, kie li malfermis konsultejon por infanoj kun parol-malfacilaĵoj.

Aliflanke, Ana Montesinos, la senlaca prizorgantino de la kongresaj ekskursoj, ree instaliĝis en Londono, kie la edzo ricevis novan postenon.

Antaŭ sia forveturo, Augusto Casquero estis nomita HONORA MEMBRO DE MEL pro siaj meritoj favore al la Liceo.

Agrabla novaĵo estas la reveno al Madrido de la usona esperantisto Denis KEef,kiu denove gvidos ĉe MEL pedagogian agadon.

Duon paĝo en "El Pais".- Fine de julio la tag-gazeto "El Pais" publikigis duonpaĝan artikolon rilate al Esperanto, rezulte de kelkaj interviuoj kun hispanaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Ĵurnalistino de "EFE" interviuis al Lupe kaj S-ro Alonso Nuñez el Galegio kiu vizitis Madrido.

Georgette kaj Lupe parolis pri Esperanto dum 20 minutoj en Radio Nacional.

"Nueva Alcarria" semaj-gazeto el Guadalajara publikigis leteron sendita de MEL pri la unua "aera konversacio" en Esperanto. Ĝi okazis inter du balonoj en 1908, la parolantoj estis S-roj Perogordo kaj Heredia.

Nova redaktoro urĝas.- Dum prekaŭ tri jaroj, la provizora redaktoro, Gian Karlo Fighiera preparis tiun-ĉi bultenon. Kiel de longe anoncite, li (kiu cetere, en Varsovio estis elektita Estrarano de UEA pri financoj) definitive forlasos la redakcian postenon fine de la nuna jaro.

"Nia Voĉo" estas la sola ligilo inter la membroj, por ke ĝi pluvivu, necesas urĝe trovi novan redaktoron.

Venontaj paroladoj.- Estas antaŭviditaj jenaj paroladoj:

"La fontoj de Esperanto" de J.M.González Aboín (Oktobro)
"Vojaĝo al Libio" de Georgo Kamaĉo (Novembro)
"La festo de Sankta Nikolao" de Ada Fighiera (Decembro)
"Komputila tradukado" de Juan Carlos Ruiz (Januaro)
"La filozofio de Kant" de Rikardo ALbert (Februaro)
"Flamenco, kanto kaj danco" de Pepe Platas (Marto)
"Akuzito Nicolo Machiavelli, ekstaru!".de Gian Karlo Fighiera (April

Deseo de veras que tu revista y
el Esperanto tengas mucho éxito
¡Felicidades por el centenario!
A. Mingote

22 julio 1987

---

72-a Universala Kongreso en Varsovio.- Sukceze okazis la Jubilean KOngreson kun preskaŭ 6.000 partoprenantoj, inter ili 11 el Madrido. MEL organizis karavaneton kaj postkongresan ekskurson tra Pollando kaj Ĉekoslovakio.

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundon, 7-an de septembro....... | "Analizo de la Varsovia Kongreso" |
| Lundon,14-an de septembro....... | Libera bufedo.Bv.alportu manĝajon aŭ trinkaĵon. |
| Lundon,21-an de septembro....... | Konversacia rondo |
| Lundon,28-an de septembro....... | Gluado de afiŝoj. |
| Vendredo 2-an de oktobro ....... | Gluado de afiŝoj. |
| Lundon, 5-an de oktobro ....... | Inaŭguro de nova elementa kurso |
| Lundon,12-an de oktobro ....... | "La fontoj de Esperanto" J.M. Glez. Boín |

La kunvenoj komenciĝos je la 20-a horo en Atocha 98-4a etaĝo.

OKAZAS EN HISPANIO

Venontaj kongresoj.- 48-a Hispana Kongreso. 14-a ĝis 18-a ju lio. Valencio.
5-a Andaluzia Kongreso. 10-a ĝis 12-a oktobro. Torrox (Malago)
!!! 1992 !!! 77-a UNIVERSALA KONGRESO. (ne konfirmita sed favore konsiderita de UEA
23-a Kataluna Kongreso. 9-a ĝis 12-a de oktobro. Barcelona

Valencia Broŝuro.- La urbo Valencio eldonis, jam la kvaran fojon, turisman broŝuron en Esperanto. Alvenis petoj al ĝi el pli ol 40 landoj.

"Popolaj ventoj".- En "Gazeto Andaluzio" aperis originala poemo de Miguel Hernández, sub titolo "Popolaj ventoj" la tradukisto estis Miguel Fernández, membro de MEL.

ESPERANTO EN LA MONDO

TIME en Esperanto.- La grava internacia revuo "Time" publikigis artikolon pri Esperanto kaj la Universala Kongreso de Varsovio en angla lingvo kaj EN ESPERANTO

LASTMOMENTA INFORMO.- Juan Carlos Ruiz, vigla partoprenanto en U.K. de Varsovio, estis operaciita meze de Aŭgusto. Feliĉe li jam estas hejme. MEL deziras lin rapidan refortikiĝon!

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID-28012

KONGRESO
47a HISPANA ESPERANTO
1887 1987
MADRIDO 1987

Ekzempleroj: 175
Redaktis: G.C. Fighiera
Tajpis: Lupe Sanz

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98
28012 Madrid

Oktobro 1987

## VIVO DE LA LICEO

Nova elementa kurso komenciĝos en la Liceo lundon la 5-an de Oktobro. Ĝi okazos ĉiusemajne lunde kaj merkrede je la 19-a horo.

Ĉiuj Madridaj esperantistoj bonvolu propagandi la kurson kaj alporti al ĝi lernantojn.

Estu membro de MEL.- La Madrida Esperanto-Liceo (MEL) povas vivi kaj sukcese agadi por Esperanto nur se ĉiuj ĉefurbaj esperantistoj apogas ĝin. La jara kotizo estas 1.800 pes., ki vi povas pagi po 150 pes. monate.

Madridanoj en Varsovio.- La membroj de MEL multe aktivis en la Varsovia Universala Kongres Georgo Kamaĉo deĵoris en la Libro-Servo de UEA dum la tuta semajno. Periko Vilaroig estis elektita estrarano de Muzika Esperanto-Ligo. Juan Carlos Ruiz aktivis en la nov-fondita Mi ta Asocio kaj publike kantis kune kun Periko hispanajn ariojn dum arta programo. Ada Fighi ra raportis dum la pac-kunveno. Ŝia edzo prezentis resolucion )akceptitan preskaŭ unuanime pri restrukturigo de UEA en kies Estraron li kontinuvole eniris. Ĉiuj aliaj Madridanoj part prenis en amaso da labor-kunsidoj kaj kulturaj programoj.

TEJO reprezentita.- Georgo Kamaĉo reprezentis TEJO-n en oficiala kunveno de internaciaj ne registaraj asocioj

Bulgara kaj japana vizitoj.- En septembro vizitis la Liceon Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de "Bulgara Esperantisto" kaj estrarano de Bulgara Esperanto Asocio, d-rino Vera Danĉeva el P ven (Bulgario) kaj Takasi Oohara (Tokio) kun la edzino.

Korekto.- En la antaŭa numero de "Nia Voĉo" ni erare skribis ke Miguel Fèrnández estas la aŭtoro de la traduko de la poemo "Popolaj ventoj" de Miguel Hernández, aperinta en "Gazeto Andaluzia". Bonvolu noti ke la poemon tradukis redaktoroj de G.A. al kiuj ni pardon-petas pro la misinformo.

Letero de Jesuo Pérez.- Alvenis amika letero de Jesuo Pérez, Bahai-Grupo de La Linea (Càdi kiun ni kore dankas.

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundon, 5-an de oktobro............. | Inaŭguro de nova elementa kurso |
| Lundon, 19-an de oktobro ............ | Libera bufedo. Bonvolu kunporti manĝaĵ aŭ trinkaĵon. |
| Lundon, 26-an de oktobro ............ | "La fontoj de Esperanto" parolado de J.M. González Aboín. |
| Lundon, 2-an de novembro ............ | "Vojaĝo al Libio" parolado de Georgo K maĉo. |

La kunvenoj komenciĝos je la 20-a horo en Atocha 98-4-a etaĝo.

Intervjuoj kun ĵurnalistoj.- J.C. Ruiz kaj G.C. Fighiera verkis broŝuron pri la valoroj de Esperanto ĝuste por informadi la ĵurnalistojn. La broŝuro estas senpage ricevebla en la Li La membroj, kiuj donas intervjuon al radio-stacioj aŭ al gazetoj, estas petataj donaci al ĵurnalistoj ekzempleron de la nomita broŝuro, por ke la artikoloj pri Esperanto estu kiel eble plej seriozaj.

Mary Luz González translokiĝis al Romo kie ŝi laboros dum unu jaro.

## OKAZAS EN HISPANIO

Hispanio gastigos la fervojistan kongreson.- Laŭ invito de Hispana Esperanta Fervojista Asocio (HESA) la 41-a Internacia Kongreso de la esperantistaj fervojistoj okazos en majo 19? en Salou, urbeto inter Valencio kaj Tarragono. Sugestojn kaj inform-petojn sendu al L?: Ronda San Antonio 46-50,2,4- 08001 Barcelono.

Andaluzia Kongreso.- La 5-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos en Torrox (Malagp) de la 10-a ĝis la 12-a de oktobro. La adreso de LKK estas: Apartado 13, 29770 Torrox (Malago)

## ESPERANTO EN LA MONDO

En la Universitaro de Vieno.- Internacia Scienca Simpozio pri Esperanto en teorio, aplika kaj socia lingvistiko, pri lingvopolitiko,-pedagogio-kibernetiko okazos sub oficialaj aŭspicioj en la Universitato de Vieno de la 28-a ĝis la 30-a de oktobro. Lekcios dudeko da tre famaj profesoroj. Adreso: Esperanto 100-jara, Postfach 92, A-1183 Wien, Austrio.


Sub la signo de socia muzo

redaktita de

William Auld kaj Stefan Maul

Serio „Stafeto" n-ro 2. 128 paĝoj. ilustrita, bindita, formato DIN A5.
Prezo: 425 BEF (plus 50 BEF afranko).
Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

**Tiu ĉi nekutima antologio estas kontribuo de MONATO, internacia magazino sendependa, al la centjara jubileo de Esperanto.**
**Ĝi enhavas poemojn originale verkitajn en la internacia lingvo, sed ne lirikajn en la kutima senco: tiuj ĉi poemoj spegulas la situaciojn sociajn, socialajn, politikajn, kulturajn kaj ekonomiajn en la epokoj inter la naskiĝo de Esperanto kaj ĝia centjara jubileo.**
**Ilustras la poemojn desegnajoj kaj karikaturoj de Georgo Kamaĉo.**
**Akompanas la versajojn kelkaj eseoj, kiuj traktas similajn temojn.**


**nia voĉo**

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98 . MADRID - 28012

KONGRESO
47a HISPANA ESPERANTO
MADRIDO 1987

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo Redaktas:G.C. Fighiera
Ekszempleroj:175 Novembro 1987 Tajpas: Lupe Sanz

=====================================================================

VIVO DE LA LICEO

Nova kurso.- Anoncita per informoj aperintaj en la Madrida gazetaro, komenciĝis en la Liceo nova kurso, kiun gvidas Dennis Keef

Intensaj kursoj.- Dennis Keef, usona profesia lingvo-instruisto momente vivanta en Madrido, ellaboris laŭŝtupan instru-metodon de Esperanto, nomatan "EK". Estas antaŭvidite, ke ekde la 4-a de novembro li gvidos en la Liceo intensajn kursojn kiuj daŭros unu semajnon (3 horoj ĉiutage) Nova elementa kurso malfermiĝos ĉiun merkredon je la 18-a horo. Vasta propagandado jam okazas en la gazetaro kaj per afiŝoj. La membraro de MEL estas varme alvokata kontribui al la sukceso de la kursoj, varbante novajn lernantojn por ili. La kotizo de la kurso estas 1.900 pesetoj.

Ĝisrevida festo. Dekk vino da liceanoj renkontiĝis por festeto, dum kiu oni adiaŭis Ana Montesinos, antaŭ ŝia forveturo al Londono. Ana dum jaroj multege kontribuis diversmaniere al la vivo de la Liceo kaj brile agadis por la sukceso de la 47-a KOngreso de E-o.

Estu membro de MEL. Se vi sentas vin esperantisto, via morala devo estas aliĝi al la Madrida Esperanto-Liceo, kiu zorgas pri la disvastigo de la internacia lingvo en la ĉefurbo kaj organizas kulturajn programojn en Esperanto. La kotizo estas 1.800 pes. jare.

Korespondaj kursoj - MEL organizas 16-lecionan korenpondan kurson por Madridanoj, kiuj ne povas persone ĉeesti voĉan kurson. La aliĝo. kiu inkluzivas lernolibron, vortaron kaj korekton de la ekzercoj, kostas 3.500 pes. Respondo al demandoj kaj duboj de la lernantoj okazos lunde je la 20-a horo en la Liceo.

La libroservo de la Liceo disponas pri jenaj libroj: "Pandemonio" (600 pes), Serio HISPANA LITERATURO: "Sentempa simfonio", "La familio de Pascual Duarte", "Astura bukedo" po 650 pes. "Sanga nupto kaj la domo de Bernarda Alba" (1.200 pes)."Analoj de Hispana Esperanto movado" (1.200 pes). "La blua hundo (100 pes).

Strato Zamenhof en Madrido.- MEL petis al Urbestro de Madrido ke la strato "Travesía del Conde Duque" sanĝu sian nomon al D-ro. Zamenhof. Tiu-ĉi strato nomiĝis tiel ĝis la jaro 1935.

Zamenhofa celebro. La 12-an de decembro, sabaton, je la 19-a horo, Madrida Esperanto Liceo festos la jaran Esperanto-tagon en la "Casa de Guadalajara" (Plaza de Santa Ana nº 15-1º). Oni prelegos Miguel Angel Sancho pri "Automata tradukado". Antaŭmendo por la sekva bankedo devas okazi ĝis la 7-a de decembro:1.000 pes por membroj, 1.200 por nemembroj de MEL.

P.F. PEGA EN LUGAR BIEN VISIBLE EL ANUNCIO ADJUNTO

Videoj.- La Liceo disponas pri du videoj. La unua daŭras preskaŭ tri horoj kaj montras la Madridan Kongreson 1987. ĝi estas donaco de Milan Sudec. La alia koncernas la aplikon de Esperanto en 16 landaj de tri kontinentoj, ĝin reĝisoris Roman Dobrzyński, ĵurnalisto de la pola televido kaj prezidanto de Pola Esperanto Asocio.

Gratuloj al novaj gepatroj. La 24-an de oktobro nia aktiva membro Juan Carlos Ruiz patriĝis. MEL kore bondeziras al li, al la edzino Maribel kaj al la bebo Sergio ĉion bonan.

Artikolo en Guadalajara.- Dank al interveno de MEL, "Nueva Alcarria", ĵurnalo de Guadalajara publikigis duon-paĝan artikolon pri Esperanto.

Frua emeritiĝo.- Profitante je favoraj specialaj cirkonstancoj, Gian Carlo Fighiera fruemeritiĝis. Li reiros al sia naskiĝ-urbo, Torino, post kelkaj monatoj.

Kristnaska Loterio.- MEL rezervis biletojn kun la [illegible]
bileto estas vendata je prezo de 100 pes. Oni povas mendi ankaŭ kun antaŭpago per ĉeko (aldoni 200 pes. se oni loĝas ekster Madrido). B.v. helpi en la vendado kaj aĉetado.

Profito de la Madrida Kongreso.- LKK transdonis al HEF kiel profiton 176.633 pes.(7.724 pes.en Kartageno kaj 36.638 pes. en Vigo, la du lastaj Kongresoj). MEL enspezis 12.216 pes kaj subvenciojn petitaj por kongresaj celoj. MEL pagis preskaŭ la tutan eldonon de la libro de Lorca (kiu estas rezulto de instiga komenca donaco de 150.000 fare de esperantisto) Tiu-ĉi verko estis donacita, kiel daŭra rememoro de la Madrida Kongreso, de MEL al la gekongresanoj, bedaŭrinde informo pri tio ne aperis en la libro, kvankam sciigo aperos en "Boletín", organo de HEF. Dank'al Lupe Sanz, la Ministerio pri Kulturo asignis subvencion de 500.000 pes. por la traduko de la libro. La diritan subvencion ricevas MEL, ĉar la tradukinto, Miguel Fernández, rezignis je siaj traduk-rajtoj.

La prezidantino demisios.- Lupe Sanz, la ŝatata kaj respektata prezidantino de MEL, demisios en la venonta Generala Asembleo de la Liceo. Ŝi donis jenajn kialojn: 1)Ŝi bezonas pli da liber-tempo por personaj aferoj. 2) Estas konvene ke aliaj liceanoj aktivu kaj konu la funkcion de la Liceo. 3)Malkonsento pri la disdono de la profito de la Madrida Kongreso. La supra decido certe signas grandan perdon por MEL, kiu estas dankema por ĉio, kion Lupe faris dum multaj jaroj por la Liceo.

Al la hispanaj grupoj.- Por kompletigi dosieron celantan atingi ke HEF estu deklarita Asocio de Publika Utiliceo, Juan Carlos Ruiz bezonas scii kiujn oficialajn helpojn (subvencioj, ejoj, eldonaĵoj, ktp.) Esperanto ricevis en Hispanio en 1987. La grupoj bonvolu sendi la suprajn informojn (kiuj aperos en "Boletín") al la Liceo.

VENONTAJ PROGRAMOJ — VENONTAJ PROGRAMOJ — VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| Lundon, 16-an de novembro...... | Libera bufedo. Ciuj estas petata alporti manĝaĵon aŭ trinkaĵon. |
| Lundon, 23-an de novembro...... | "Vojaĝo al Libio" parolado de G. Kamaĉo. |
| Merkredon, 25-an de novembro... | Prezentado de "Sanga nupto" tradukita de Miguel Fernández. ATENEO. Prado 21. 19,30 |
| Sabaton, 12-an de decembro..... | Zamenhof-celebro. CASA DE GUADALAJARA Plaza de SAnta Ana 15. 19,00 h. |

Valencio, venonta kongreso.- Kelkaj madridaj esperantistoj dum oktobro renkontiĝis en Valencio kun la prezidanto de LKK de la venonta hispana kongreso. Estas konsilinde aliĝi frue al la kongreso.
Necesas aldoni ke Valencio verŝajne gastigos la U.K. de Esperanto en 1992.

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98 . MADRID - 28012

KONGRESO ESPERANTO 47a HISPANA
MADRIDO 1987

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Decembro 1987

---

.- La libro "Sentempa Simfonio", antologio de hispana poezio eldonita de MEL laŭ subvencio de UNESCO-HISPANIO, estas elĉerpita en la Liceo, oni devas peti rekte al libroservo-HEF.

.- Sabadell, Terrassa kaj Sant Cugat del Vallés estas proponitaj en la pasinta HEF-kunveno por la 50-a Hispana Kongreso de Esperanto (1990).

.- ILEI petis al Ministerio pri Edukado kreon de Oficiala Kolegio de Profesoroj de Esperanto rekonita de la Ŝtato samgrade kaj samrajte kiel aliaj oficialaj kolegioj. Ili bezonas tre urĝe scii kiom da diplomitaj de HEF esperantistaj instruistoj deziras esti membroj de la estonta kolegio. Bv. sendi al ILEI. Sol 75. 41003 Sevilla: nomon, adreson, DNI.

.- MEL kore dankas al Sro Anglada kiu sendis loteri-bileton por la Liceo (n-ro 52273, 100 pes.). Ni tostos per lia ŝaŭma vino ESPERANTO dum la venontaj festoj.

.- La Avilesa Kultura Fondaĵo petos, je la nomo de Avilesa Esperanto Asocio, premion "Príncipe de Asturias de la Concordia" 1988 por la internacia lingvo Esperanto. Bv. Skribu kiel apogo de lia peto al "Fundación Principado de Asturias" c/ Pérez de la Sal 20. 33007 Oviedo.

.- Lorca en la Ateneo.- La 25-an de novembro, Miguel Fernández prezentis publike sian tradukon en Esperanto de du teatraĵoj de Lorca. Dank' al Adelaida las Santas la Ateneo denove akceptis esperantistojn

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

Dimanĉon, 6-an de decembro............. FIESTA DE LAS MIGAS. Jadraque(Guadalajara). Ni renkontiĝos en Jadraque je la 11,00h.

Sabaton, 12-an de decembro............. ZAMENHOFA FESTO. Casa de Guadalajara. Plaza Santa Ana 15-1º.
Miguel Angel Sancho Prelegos(19,00 h.):"Aŭtomata tradukado".
Bankedo je la 21,00. Antaŭmendo devas okazi ĝis la 7-a de decembro: 1.000 pes. membroj, 1.200 por nemembroj de MEL.

Lundon, 21-an de decembro............. Prelego de Ada Sikorska "La festo de Sankta Nikolao".

!!!! F E L I Ĉ A N   K R I S T N A S K O N !!!!!

---

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98 . MADRID - 28012

KONGRESO HISPANA ESPERANTO 1987

.- Invitados de honor: Simo Milojevic, director de la oficina central de la Asociación Universal de Esperanto en Roterdam y William Auld, escritor y académico de la Academia de Esperanto.

.- Ciencia y cultura:-Diversas conferencias sobre arte y ciencia, entre las que destacó una sobre las aplicaciones del rayo laser, todas en Esperanto.

.- Excursiones: Visitas a diversos lugares de Madrid. Viaje a Toledo.

.- Propaganda: Diez emisoras de radio, tres programas de TV, diversas entrevistas, artículos, etc.

.- Comité de Honor: S.M. el Rey, cuatro ministros, tres rectores de Universidad y varias personalididades del mundo de la cultura, las artes y la política.

## OTRAS ACTIVIDADES

.- Un miembro de MEL fué invitado por la Asociación Universal de Esperanto para analizar la función y organización de las diversas secciones de la Asociació y elaborar un informe sobre el tema. Se presentaron 44 propuestas para mejorar el actual servicio.

.- MEL durante 1987 ha recibido visitas de esperantistas de los siguientes paises: Angola, Holanda, Gran Bretaña, Paises Bajos, EEUU, Bélgica, Alemania, Italia, Francia, Bulgaria, Japón y Portugal.

.- Exposición de libros de Esperanto en Hemeroteca Nacional y Sala de Exposiciones de Caja Madrid.

.- Preparación de un dossier para solicitar que la Federación Española de Esperanto sea declarada de "Utilidad Pública".

.- Tertulia en Esperanto semanal

.- Excursiones recreativas a localidades próximas a Madrid.

.- Contacto con esperantistas extranjeros en los viajes de placer o trabajo de los miembros del MEL

.- Aumento del fondo bibliografico de la Biblioteca de MEL

.- Edición mensual del boletín informativo "Nia voĉo"

.- El coro de MEL, "Verda Stelo", ha continuado su labor de traducción y adaptación al Esperanto de canciones populares españolas.

.- La sección juvenil de MEL ha seguido manteniendo intercambio internacional de programas de ordenador, ideas, etc. en Esperanto con otros grupos de aficionados a la informática.

.- Estrecha colaboración de MEL con la oficina que tiene en Madrid la Federación Española de Esperanto.

Esta memoria es fundamental para pedir subvenciones. Envia al Liceo tus comentarios (si falta o sobra algo) antes del 31.12.87

Madrid 31 de diciembre de 1987

Fdo. G. Sanz Bueno
Presidenta de MEL

RADIO TV y PRENSA

Con participación de miembros de MEL se han emitido espacios radiofónicos en las siguientes em isoras de Madrid: COPE, Radio Cadena, Onda Madrid, RNE, Antena 3. Tanto TVE como el Informativo Regional de Madrid se han ocupado del Congreso Nacional de Esperanto ocurrido en Madrid.

Diversos periódicos nacionales y regionales se han hecho eco de la celebración del Congreso de Madrid. En especial "El Pais", Agencia EFE, "Nueva Alcarria" de Guadalajara y "El Adelantado"de Segovia han publicado amplios espacios sobre el Centenario del Esperanto.

PUBLICACIONES

Con ocasión del Centenario de la Creación del Esperanto se han prodigado en todo el mundo las publicaciones commemorativas. MEL, gracias a las subvenciones obtenidas, ha editado las siguientes obras:

.- "Datos acerca del movimiento esperantista" 10 pg. CAJA MADRID
.- "Hispanio".M.TRANSPORTES TURISMO Y COMUNICACIONES. Traducido por R. Urueña
.- "Sanga nupto. La domo de Bernarda Alba". M.CULTURA.Traducción de Miguel Fernández.
.- "Sentempa Simfonio".COMISION ESPAÑOLA DE UNESCO.Traducción de Fernando de Diego. Antología de poesía española en Esperanto.
.- "Pandemonio". Publicación de la Asociación Andaluza de Esperanto en la que han colaborados cuatro autores de MEL.
.- "Sub la signo de socia muzo" publicado por los esperantistas belgas. Las ilustraciones y caricaturas han sido realizadas por Jorge Camacho de MEL.
.- "La blua hundo".EGUACANTOS.Traducción de M. Fernández Martín.
.- "Astura bukedo".Publicado por la Asociación Asturiana de Esperanto.Jorge Camacho de MEL ha colaborado en la traducción de esta antología de autores asturianos.

CONGRESOS Y REUNIONES ESPERANTISTAS

Miembros de MEL han participado en los siguientes congresos y reuniones esperantistas:

.- 47º Congreso Español de Esperanto. Madrid
.- 72º Congreso Universal de Esperanto. Varsovia (Polonia)
.- 3º Congreso Andaluz de Esperanto. Torrox (Málaga)
.- Seminario Internacional de Jóvenes Esperantistas. Alemania
.- Congreso Internacional de Jóvenes Esperantistas. Cracovia (Polonia)
.- 11ª Reunión de la Asociación Juvenil Española de Esperanto. Madrid
.- Encuentro Internacional de Jóvenes Esperantistas. Hungría.

La organización del 47º Congreso Español de Esperanto corrió a cargo de MEL, el evento fué un éxito de asistencia y organización como lo atestiguan las críticas aparecidas en las revistas esperantistas. Los resultados se pueden resumir en:

.- Participación. La mayor desde hace muchos años (350 congresistas)
.- Programa: Más amplio y completo que en ediciones anteriores.
.- Literatura: Se presentaron 10 nuevas publicaciones en Esperanto editadas por diversos grupos españoles. MEL regaló a los congresistas parte de la edición de su publicación "Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba".
.- Teatro: El Grupo de Teatro Búlgaro en Esperanto representó dos obras "La cueva

# MEMORIA DE LAS ACTIVIDADES DEL AÑO 1987

## Madrida Esperanto-Liceo

Durante 1987 se ha celebrado en todo el mundo el Centenario de la Creación de la Lengua Internacional Esperanto. Entre las actividades conmemorativas del Centenario que ha llevado a cabo Madrida Esperanto-Liceo (MEL) destaca la organización del 47º Congreso Español de Esperanto en Madrid y la edición de dos obras de literatura española traducidas al Esperanto: "Sentempa Simfonio" subvencionada por la Comisión Española de UNESCO y "Sanga Nupto y La domo de Bernanrda Alba" que consiguió que,por primera vez en la historia del movimiento esperantista español, el Ministerio de Cultura subvencionara la traducción de una obra al Esperanto

A continuación se resumen las actividades organizadas por el MEL durante el año 1987 incluyéndose tambien aquellas en las que han tomado parte sus asociados aunque han sido organizadas por otras asociaciones.

### CONFERENCIAS

Se han pronunciado las siguientes conferencias y proyecciones comentadas:

.- "Esperanto kaj paco" Rafaela Urueña
.- "La veturado de Pioneer 10".Fernando Marcos
.- "Maloficiale pri la lando de la 72-a U.K.".Ada Sikorska
.- "Madrido hieraŭ kaj hodiaŭ".J.C. Ruiz Sierra
.- "Braille kaj Zamenhof". Angel Figuerola
.- "100 años de Esperanto" J.C. Ruiz Sierra
.- "Una esperantista en el Ateneo". Lucrecia San Antonio
.- "Mi estas denaska esperantistino". Eva Fromaggio
.- "Perkomputila instruado de Esperanto".Bruce Sherwood
.- "Centenario de la Lengua Internacional" J.Fernández-Arroyo
.- "La fontoj de Esperanto" J.M. González Aboín
.- "Vojaĝo al Libio". Jorge Camacho
.- "La festo de Sankta Nikolao" A. Fighiera
.- "Automata tradukado" Miguel Angel Sancho
.- "La Esperanto-movado en Bulgario". Donĉo Ĥitrov
.- "U.K. en Ĉinio" Película de J. Fernández Arroyo
.- "Esperanto" película de la Asociación Polaca de Esperanto.

Varios miembros del MEL viajaron y pronunciaron conferencias en Budapest, Belgica y Grecia.

### ENSEÑANZA

Según los Estatutos el fin primordial de MEL es la enseñanza y difusión del idioma Esperanto, para ello se han organizado durante el año 3 cursos elementales de tres meses de duración y varios intensivos de tres horas diarias durante una semana aplicando el método "EK" desarrollado por Dennis Keef.

Miembros de MEL impartieron clases en Segovia, Universidad Popular de Alcorcón, Club de Amigos de Unesco y Centro Cultural de Ventas.

MEL puso en marcha un curso por correspondencia especial parA residentes en Madrid.

Durante todo el año se desarrolló un curso avanzado de nivel superior.